

La 100-jara Memorevento de la Fondiĝo de EPA

Ni faru la mondon
plena je Esperanto!



Dato (ĉefaj eventoj) : De la 16-a (sab.) ĝis la 18-a (lun.) de septembro, 2023

Loko : Oomoto-Centro

Adreso : Ten'on-kjo, Kameoka-ŝi, Kioto-fu 621-8686, Japanio

Organizanto : Esperanto-Populariga Asocio (EPA)



Retejo de EPA :

<https://www.facebook.com/EPAOomoto/>

Retadreso : oficejo@epa.jp

Dato (Bv. referencu programon pli detale)

La 15-an de septembro (ven.)

Alveno de eksterlandaj partoprenantoj

La 16-an de septembro (sab.)

10:00 Orientado

13:00 Simpozio (※ 1)

14:30 Grupetiĝo, Piediro en Ten'on-kjo,
Teceremonio

19:00 Fakkunsidoj

La 17-an de septembro (dim.)

10:00 La 100-jara Memorevento
(Oomoto-stila Diservo) (※ 2)

12:15 Memorfoto

14:00 Esperanta Utafesto de Oomoto (※ 3)

15:30 Memorpalego (※ A)

17:30 Interkona Vespero

La 18-an de septembro (lun.)

8:30 Ekskurso (adorvizito) al Ajabe,
naskiĝloko de Oomoto

17:00 Disiĝo

18:30 Orientado pri Interkona Kunveno
organizata de filio de EPA (nur volontuloj)

La 19-an de septembro (mar.)

Interkona Kunveno en filio de EPA (nur
volontuloj)

※ 1,2,3 estos elsendata por interretaj partoprenantoj per Zoom-webiner kaj A estos elsendata per Ju-tubo al publiko.

※ La programo povas ŝanĝiĝi laŭ la situacio de pandemio de KOVIM-19.

Memorpalego ※ per E kaj la japana

La 17-a (dim.) 15:30 ~ 17:00

Preleganto : Margaret Zaleski-Zamenhof (Kuracisto, Pranepino de L.L.Zamenhof), "Esperanto kaj familio Zamenhof". Ĉi palego estas aŭspiciita de JEI.



La 100-jara Memorevento ※ per E kaj la japana

La 17-a (dim.) 10:00 ~

Oomoto-stila Diservo. Oferado: Kantado de Ambona Kanto kaj "La Espero". (daŭre) Ceremonio : Salutoj de la honora prezidanto de EPA, prezidanto de EPA kaj gastoj eksterlandaj kaj enlandaj. Honorigo de kontribuintoj. Palegeto de gejunuloj

Esperanta Utafesto de Oomoto ※ per E kaj la japana

La 17-a (dim.) 14:00 ~

Ni varbas la Esperantan utaon. Por fari ĝin, bonvole referencu aldonitan dokumenton. Devas esti sendita ĝis la 14-a de majo, 2023. Elektitaj utaoj estos ĉantataj en la Utafesto.

Simpozio ※ nur per E

La 16-a (sab.) 13:00 ~ 14:30

Temo (prozizore) : La Revo post la 100-jariĝo de EPA. Palegantoj ankoraŭ ne estas publikigitaj.

Fakkunsidoj ※ nur per E

La 16-a (sab.) 19:00 ~ 21:00

Kurso fare de d-roj Katalin Kováts kaj Margaret Zaleski-Zamenhof. Krome, pri Universala Homama Asocio. Utafesto. ktp.



Interkona Vespere

La 17-a (dim.) 17:30 ~ 21:00

Kantado per E fare de ĉiu laŭgeneracia organizo de Oomoto, ktp.. Via prezentado estos bonvena.

Kotizo por partopreno

- (1) Tuta Programo (vespermanĝo en la 15-a ~ tagmanĝo en la 18-a)
: 10,000 enoj
- (2) Tri-taga : 8,000 enoj
- (3) Du-taga : 6,000 enoj
- (4) Unu-taga : 3,000 enoj
- (5) Interreta : senpage
- (6) Monofero : bonvena

La kotizo inkluzivas manĝadon kaj tranoktadon. Se temas pri kategorio (5), memoraĵo ne estos donita.

Ir-reveno

Du busoj aranĝota de Kansaja Internacia Flughaveno al Oomoto-Centro en la 15-a. Unu buso aranĝota de Oomoto-Centro ĝis la Kansaja Internacia Flughaveno en la 19-a. Senpage.

Tranoktado

Tranoktejo en Ten'on-kjo, Kameoka.

Memorfoto

Post la evento sendata retpoŝte.

Memoraĵo

Verda botelo

Ekspozicioj

- ① Ekspozicio pri la historio de 100-jariĝo de EPA «ĉe la 1-a etaĝo aŭ la 2-a etaĝo de Miroku domo»
- ② Ekspozicio pri memoraĵo pri Esperanto kaj doktoro Zamenhof «ĉe la 1-a etaĝo de Miroku domo» Se vi volas ekspozicii aĵon, tio estos bonvena.
- ③ Ekspozicio pri la originala pentraĵo por la

kovrilo de la revuo Nova Vojo «ĉe la 3-a etaĝo de Miroku domo

Ili ekspoziciigos de la 15-a (ven.) ĝis la 20-a (mer.) de septembro.

Interreta Elsendo

Simpozio en la 16-a, la diservo kaj ceremonio por la 100-jariĝo de EPA kaj Esperanta Utafesto de Oomoto en la 17-a estos vive elsendata per Zoom-webiner por interretaj partoprenantoj. La memorprelego en la 17-a estos vive elsendata per Ju-tubo por publiko.

aliĝo

De la 4-a de februaro ĝis la 30-a de junio, 2023

Memorpubliko

- ① La 1-a Volumo de "Rakontoj el la Spirita Mondo"
verkinto : DEGUĈI Onisaburo
tradukanto : MAEDA Ŝigeki
prezo : 2,200 enoj
- ② CD (15 Ambonaj kantoj + "La Espero")
prezo : 1,500 enoj

Interkona Kunveno organizata de filio de EPA

Se vizito al EPA-filio estas dezirata, bonvole aliĝu al EPA ĝis la 14-a de majo. Se la EPA-filio akceptos vin, vi rajtas viziti tien. Kutime tie okazos interamikiĝa kunveno kun surlokaj oomotanaj esperantistoj.

Kontakto

Esperanto-Populariga Asocio (EPA)

ADRESO : Ten'on-kjo, Kameoka-ŝi, Kioto-fu
621-8686, Japanio

TEL : +81-771-56-9074

FAX : +81-771-22-9949

HP : <https://www.facebook.com/EPAOomoto/>

E-mail : oficejo@epa.jp

Oni povas aliri al ĉi tiu "Informilo (Esp.)" interrete de suba QR.



Programo de la 100-jara Memorevento de la Fondiĝo de EPA en 2023

Tempo	9/15 (ven.)	9/16 (sab.)	9/17 (dim.)	9/18 (lun.)	9/19 (mar.)	
6:00						
7:00		6:30 Matenpreĝo Matenmanĝo	6:30 Matenpreĝo Matenmanĝo	6:30 Matenpreĝo Matenmanĝo	6:30 Matenpreĝo Matenmanĝo	
8:00					8:00 al filioj de EPA (Volontuloj)	
9:00		8:30 partopreno en matenkunveno	8:30 libere	8:30		
10:00	alveno al Kansaja Internacia Flughaveno	10:00 Orientado kaj interamikigo Miroku-domo · Halo	10:00 Memorfesto kaj evento de la 100-jara jubileo prelegotoj de gejunuloj preĝejo Banŝo-den	Ekskurso al Ajabe, naskiĝloko de Omoto (ĉe 12:00 tagmanĝo)	· Ekspozicioj La 100-jara historio de EPA Miroku-domo la 2-a etaĝo aŭ la 1-a etaĝo	
11:00		11:30 tagmanĝo				12:15 memorfoto, tagmanĝo
12:00						
13:00		13:00 Simpozio Miroku-domo · Halo	ripozo			
14:00		14:30 grupetigo	Esperanta Utafesto de Omoto preĝejo Banŝo-den			
15:00		klarigo pri sanktejo	te-ceremonio Miroku-domo la 1-a etaĝo			15:30 Memorprelego de d-ro Margaret Zaleski Zamenhof preĝejo Banŝo-den
16:00					E-belartraĵoj Miroku-domo la 1-a etaĝo	
17:00	17:00 alveno al Kameoka vespermanĝo	17:10 vesperpreĝo vespermanĝo	17:30 Interkona Vespero (prezentado, Aikido, Tamburado Miroku-danco ktp) Miroku-domo · Halo	17:00 reveno al Kameoka vespermanĝo	Originalaj pentraĵoj por la revuo "Nova Vojo" Miroku-domo la 3-a etaĝo	
18:00				18:30 Orientado pri filioj de EPA (Volontuloj)		
19:00	19:00 Amika Vespero Miroku-domo · Halo	19:00 Fakaj Kunsidoj Ansej-kan, la 5-a etaĝo				ankaux elsendo per Zoom webinar
20:00						
21:00	21:00 banigo	21:00 banigo	21:00 banigo	21:00 banigo	ankaux elsendo per Jutubo	
22:00						
23:00	tranoktado (en Kameoka)	tranoktado (en Kameoka)	tranoktado (en Kameoka)	tranoktado (en Kameoka)	tranoktado (en filioj de EPA)	

Kiel priversi utaoon por ĉantado en Esperanto?

kontrolita de MAEDA Ŝigeki
verkita de OKUŬAKI Toŝiomi

La memora evento de la 100-jara jubileo de EPA okazos septembre en 2023. Kadre de tio, Utafesto per Esperanto okazos. Ni esperas, ke multaj kontribuos Esperantajn utaojn por ĝi. Ĉi-foje mi klarigas kiel priversi utaoon por ĉantado en Esperanto. Bonvole sekvu jenajn 3 regulojn por farado.

- ① La formo konsistas el 5 linioj kun 31 silaboj. Devas esti 5 silaboj en la 1-a linio, 7 silaboj en la 2-a, 5 silaboj en la 3-a, 7 silaboj en la 4-a, kaj 7 silaboj en la 5-a. Do, sume 31 silaboj.
- ② Utao komenciĝas de forta pulso kaj finiĝas per la forta post regula ripetado de pulsoj forta kaj malforata. Kaj la akcento de la vorto nepre devas veni al forta pulso (La silabo krom akcento de la vorto povas esti ambaŭ, ĉu forta pulso aŭ la malforata).
- ③ Oni povas elipsi o-finaĵon de substantivo kaj literon "a" de artikolo, kiam oni bezonas tion en la versfarado. Kiam oni elipsas la finaĵon "o" disde ia substantivo, oni anstataŭas per apostorofo: mont', nokt', temp' k.a. Tiel same ĉe artikolo oni anstataŭas per apostrofo: de l' maro.

Mi klarigas plu pri la reguloj, uzante la jenan ekzemplon de utao.

Ha, senĉese nub'
leviĝas ĉe Izumo
kiel la palac'
ja multoblebarila,
tiun dikbarilon mi - .

Temas pri **la regulo ①**. Unue, bonvole konfirmu la nombrojn de linioj kaj silaboj.

《la 1-a linio》	Ha,/sen/ĉe/se/nub'	5 silaboj
《la 2-a》	le/vi/ĝas/ĉe/I/zu/mo	7 silaboj
《la 3-a》	ki/el/la/pa/lac'	5 silaboj
《la 4-a》	ja/mul/to/ble/ba/ri/la,	7 silaboj
《la 5-a》	ti/un/dik/ba/ri/lon/mi - .	7 silaboj
	sume :	31 silaboj

Tiel devas esti 31 silaboj en 5 linioj.

La utao konsistas el 5 linioj. Bonvole atentu tion, ke ĉiu linio havu grupetiĝon de signifo. Ekzemple, se la frazo estas trans linioj kiel jene, ne bone.

《la 3-a》 ...kiel
 《la 4-a》 la palac'...

Temas pri **la regulo ②**. Utao konsistas el 31 silaboj. Al ĉiu silabo pulso forta aŭ malfora estas disponita kiel jene.

《la 1-a linio》	● ○ ● ○ ●	● ...forta
《la 2-a》	○ ● ○ ● ○ ● ○	○ ...malfora
《la 3-a》	● ○ ● ○ ●	
《la 4-a》	○ ● ○ ● ○ ● ○	
《la 5-a》	● ○ ● ○ ● ○ ●	

Por plifaciligi la komprenon al neĵapanaj esperantistoj, kiuj estas poetoj de Esperanto aŭ kiuj scipovas versi poemon, ni sugestas, ke la unua kaj la tria kaj la kvina linio estu trokeo vira kaj la dua kaj la kvara estu jambo ina.

La 1-a, 3-a, kaj 5-a linio : trokeo vira

La 2-a, kaj 4-a linio : jambo ina

La vorto (pli ol 2-silaba vorto) de Esperanto havas akcenton en la 2-a silabo de fino. Ekzemple la vorto "senĉese" havas akcenton al "e" post "ĉ". Kaj ĉi tiu "e" devas esti ĉe la fortpulsa. Tiel, silabo kun akcento en la vorto devas esti ĉe la fortpulsa. Aliflanke, 1-silaba vorto kaj silabo krom silabo kun akcento en la vorto rajtas esti ambaŭ ĉe la forta kaj ĉe la malforta. Ni konfirmu tion jene.

- ...forta
- ...malforta
- ...akcento de vorto

● ○ ● ○ ●
 «la 1-a linio» Ha, sen ĉe se nub'

○ ● ○ ● ○ ● ○
 «la 2-a» le vi ĝas ĉe I zu mo

● ○ ● ○ ●
 «la 3-a» ki el la pa lac'

○ ● ○ ● ○ ● ○
 «la 4-a» ja mul to ble ba ri la,

● ○ ● ○ ● ○ ●
 «la 5-a» ti un dik ba ri lon mi - .

En ĉi tiu utao la vorto Izumo estas propra nomo, kiu temas pri antikva regiono en Japanio; tial ne gravas akcento.

La silabo kun akcento en ĉiu vorto estas ĉe la fortpulsa. La vorto *palac'* devenas de la vorto *palaco* kaj fina "o" estis anstataŭigita per apostrofo, sed la pozicio de akcento en la vorto ("a" antaŭ "c") ne ŝanĝiĝas.

Kiam oni apostrofas je artikolo rilate al **la regulo** ③, oni devas atenti. Laŭeble oni devas plenumi tion, en la kazo, kiam ĝi ne kaŭzas konfuzon. Neniom okazas konfuzo, se oni apostrofas post prepozicio kun vokala finaĵo, ekzemple, "de l' ", "ĉe l' ", "pri l' " ktp. Sed la elipso ofte invitas la konfuzon antaŭ la vorto, kiu komenciĝas per vokalo. Ekzemple, "l' avo" (prononceblas: lavo), "l' ano" (lano), "l' amo" (lamo: besto) ktp. Krom tio tute ne efikas la elipso inter konsonantoj: "sur l' ĉevalo", "en l' domo", ĉar la konsonanto "l" sola tre malfacile aŭdiĝas, cetero tre malfacile prononceblas.